



2/2006
Februaro/Marto

Komenciĝis laboroj en la Esperanto-Domo



Tiom rapide ni mem ne atendis la komencon de la renovigaj laboroj en la klubejo. Sed nun nia amiko *Andrzej*, kiu jam plurfoje helpis al ni, kiam ni mem ne povis efektiviĝi ian laboron, venis al ni por fari la necesajn riparojn kaj renovigojn. En la kuirejo malaperis la malbela PVC-kovraĵo kaj nun la planko

estas
kovrita per
kaheloj.
Li ankaŭ
jam farbis
la murojn
kaj la
niĉon
malantaŭ
la
radiatoro
en la kluba
salono.
Finfine
nun ankaŭ
la ŝtuparo
inter la du
etaĝoj
estas bele
ekipita per
kaheloj,
kiuj certe
estos pli
daŭremaj
ol ia
tapiŝo.

Editoraĵoj

Eldonanto: *Hamburga Esperanto-Societo*
r. a.

Klaus-Groth-Str. 95, D-20535 Hamburg
Tel/Faks: +49 40 250 30 65

Prezidanto: [Jürgen Wulff](#)

Redaktoro: [Benno Klehr](#)

Retpoŝto: [Esperanto-Hamburg](#)

Redaktofino de



n-ro 3/2006: 15-03-2006

Sentenco

La esenco de la feliĉo

Karaj legantoj,

Baldaŭ okazos nia jarĉefkunveno, dum kiu la membroj de la klubo decidas pri la evoluo de la Esperanto-Societo. Mi ŝatus memorigi niajn membrojn, ke tiu dato estas la plej grava evento de la kluba jaro, kaj ke ĉiu membro ĉeestu. Nia klubo bezonas aktivan kunlaboron de la membroj, kiuj uzas siajn membrorajtojn.

Benno Klehr

Koŝeraj nutraĵoj

Dum aĉetado mi konstatis kun plezuro, ke la juda vivo revigliĝas en Hamburgo. Ne nur la Internacia Lingvo laŭ Ludoviko Zamenhof kreas interkompreniĝon, sed ankaŭ la manĝaĵoj. Koŝeraj nutraĵoj estas haveblaj en Hamburgo en la vendejo Ma'ayan (Fonto). Do por viaj gastoj vi povos aĉeti bongustajn koŝerajn

estas, esti oni mem. <i>Erasmus de Roterdamo</i>	nutraĵojn - bona sento. Interalie estas haveblaj: Bovid- kaj bovviando, kortbirdoj, israelaj produktoj, fromaĝoj, vinoj, dolĉaĵoj kaj aliaj. Krome Esperanto-flugfolioj. La vendejo troviĝas en Grindelberg 41. <div style="text-align: right;"><i>Rainer Haupt</i></div>
---	---

Nia programo

Februaro	Marto
2 Komuna kantado de popolkantoj <i>kun Ralph Glomp</i>	2 Harema Festo <i>(kun ventrodancado)</i>
9 Jarĉefkunveno de Hamburga Esperanto-Societo Jahreshauptversammlung	4 (Sabato 13 h) <i>Mariko Aoŝima</i> Hispana kuirarto
16 Benno Klehr: Lingvaj Ludoj	9 Rudi Haberland: Sinonimoj en Esp.
23 Video: Denglish Gefahr für das Deutsche	16 Niaj novaj Libroj
	23 La ega kesteto <i>Video 7-lingva</i>
	30 18 h: estrarkunsido 20 h: Lingvo-Ludo

**Einladung zur Jahreshauptversammlung
des Esperanto-Vereins Hamburg e. V.
am 9. Februar 2006 um 20.00 Uhr
im Esperanto-Haus Hamburg**

Tagesordnung in [Esperanto Hamburg Nr. 1/2006](#)

**La jarĉefkunveno
de Hamburga Esperanto-Societo
okazos la 9an de Februaro 2006
je la 20a horo en la Esperanto-Domo**

Invito al daŭriga kurso en 2006

Ankaŭ ĉi-jare okazos sabata daŭriga kurso en la klubejo. Ĝi ofertas variajn eblecojn plibonigi viajn spertojn en kaj pri Esperanto kaj la eblecon prepari al ekzamenoj. Detalojn dum la unua kurs-renkontiĝo la 18an de Februaro.
Kotizoj: Por HES-anoj senkoste, krom eble necesaj materialoj ktp. (ekz-e ekskursoj, nutraĵo/trinkaĵo dum la ĉe-esto) sed donaco al la klubo bonvenus. Aliaj: 60 EUR kaj eventualaj krompagoj (vidu sube).

Einladung zum weiterführenden Kurs 2006

Auch dieses Jahr findet der weiterführende Samstags-Kurs im Klubhaus statt. Er bietet verschiedene Möglichkeiten, Eure Kenntnisse in und über Esperanto zu verbessern und die Möglichkeit, Euch auf ein Examen vorzubereiten. Details dazu während des ersten Treffens am 18. Februar. Kosten: Für HES-Mitglieder kostenfrei, außer für evtl. nötige Materialien usw. (z.B. Ausflüge, Essen/trinken während des Kurses) aber eine Spende für den Klub ist willkommen. Alle anderen: 60 EUR und evtl. zusätzliche Kosten (siehe oben).

Datoj / Termine:

18.02. • 11.03. • 01.04. • 22.04. • 13.04. • 24.06.

(3a de Junio ne estos pro GEK) • ĉiam/immer 13:00 - 17:00 h.

Pliaj informoj aŭ aliĝo ĉe: [Peggy Ley](#)

Hispana kuirkurso

Sabaton, 4.3.06, 13 h.

Kotizo : 10 eŭroj por persono
inkulzive materialoj.

Partoprenantoj: 5 ĝis 10 personoj.

Bonvolu aliĝi en la klubejo aŭ rete ĉe [HES](#).

Elkoran saluton, Mariko

[Re al Esperanto en Hamburg](#)